



**Ĉu vi legis ĉi tiun
fablon?**

**Iam okazis, en tiuj prapratempoj,
kiam la bestoj parolis esperante,
Grilo kaj Formiko estis veraj amikoj...**

**Dum la tuta aŭtuno, Formiko laboris
senhalte, gardante manĝaĵon por la vintro.**



Ĝi ne profitis la sunon, nek la agrablan venteton de la vespero, nek konversacion kun amikoj dum drinketo de biero post labortago.



**Dume, Grilo kantis kun amikoj en la
drinkejoj de la urbo. Ĝi ne malprofitis eĉ
unu minuton. Ĝi kantis dum la aŭtuno,
dancis kaj profitis la sunon, ĝuis multe, ne
pensante pri la aĉa vetero kiu venos.**



Post kelkaj tagoj, komenciĝis la malvarmo. Formiketo, laca pro tiom da laboro, sin protektis en sia malriĉa hejmo, kiu estis plena je manĝaĵo ĝis la plafono.



Post iom da tempo, iu ĝin vokis de la strato. Ĝi malfermis la pordon kaj... mirinde... estis la amiko Grilo, kiu sidis en Ferrari, kaj uzis multvaloran pelton.

Diris al ĝi la Grilo:

- Saluton, amiko! *Mi iras al Parizo por tie loĝi dum la vintro. Ĉu vi povas zorgi pri mia hejmeto?*

Kaj respondis la Formiko:

- *Certe! Senprobleme. Sed, kio okazis? Kie vi sukcesis trovi monon por iri al Parizo, por aĉeti ĉi tiun Ferrari kaj tiun belan kaj multkostan vestaĵon?*

Kaj la Grilo ĝin respondis:

- Mi estis kantanta en drinkejo pasintan semajnon, kaj jen reĝisoro ŝatis mian voĉon... *Mi subskribis kontrakton por dancospektakloj en Parizo.*

Ĉu vi bezonas ion de tie?

Respondis la Formiko:

- Jes! Bonvole, se vi renkontiĝos kun **La Fontaine**, diru, ke li enmerdiĝu!

Moralo de la Fablo

Ĝuu la vivon, laboru kaj amuziĝu proporcie, ĉar tro labori nur alportas bonojn...
en la fabloj de *La Fontaine*.

Se vi ne trovos vian oranĝo-duonon, ne malesperu,
serĉu vian citron-duonon, sukerigu ĝin, miksu ĝin
kun brando kaj glacio... kaj estu feliĉa!

Memoru: vivi nur por labori estas tre bona...
por la monujo de via mastro!

Guu belan tagon!

